

INFORMATIVO DA ASSOCIAÇÃO PAULISTA DE ESPERANTO



<http://easp.org.br> – Redação: Paulo S.Viana

1º de Outubro 2025

CONGRESSO PAULISTA DE ESPERANTO DESTACA A IMPORTÂNCIA DA LITERATURA



A formação cultural de cada povo depende de múltiplos elementos. Um deles é a literatura, que ajuda a compor o espírito coletivo. A França não seria a mesma sem Victor Hugo; a Inglaterra, sem Shakespeare; o Brasil, sem Machado de Assis." Também o "povo Esperantista" tem seus clássicos e seus autores modernos.

Este foi o teor das ideias que circularam no 17º Congresso Paulista de Esperanto, que aconteceu em 20 e 21 de setembro 2025, na cidade de S. José dos Campos, organizado pela Associação Paulista de Esperanto. Participaram falantes da Língua Internacional de sete estados brasileiros. O programa, dirigido pelo jovem Esperantista e poliglota Wilian Gomes (SP), incluiu palestras, debates, oficinas, momento de arte e venda de livros. Na ocasião, foram lançados quatro novos livros em Esperanto, todos editados pela referida associação e disponíveis em sua loja:

- "Morto sur la Relikvo" ("Morte sobre a Relíquia"), romance original, de Adonis Saliba;
- "Prediko de la Diabolo kaj aliaj rakontoj" ("O Sermão do Diabo e outros contos"), de Machado de Assis, em tradução de Francisco S. Wechsler;
- "Negrinjo kaj aliaj noveloj" ("Negrinha e outros contos"), de Monteiro Lobato, em tradução de Paulo S. Viana e Francisco S. Wechsler;

- "La Ribelema Raŭpeto" ("Lála, a Lagartinha Rebelde"), livro infantil de Dirce Sales.

Entre as exposições, estiveram os seguintes temas:

- "A Poesia transpõe o tempo" (Saulo Wanderley, RJ);

- "Tradução de canções e poemas para o Esperanto" (oficina de Cícero G. Soares, BA);

- "Filatelia: a diversidade de línguas" (James Piton, SP);

- "Monteiro Lobato e a censura" (Francisco S. Wechsler, SP);

- "A importância da literatura infanto-juvenil" (Dirce Sales, RJ);

- "Monteiro Lobato – sua vida e dificuldades para traduzi-lo" e "Debate sobre o Movimento Esperantista no século 21" (Paulo S. Viana, SP);

- "Programo Mia Amiko" e "O que pode a Inteligência Artificial" (Adonis Saliba, ES);

- "Princípios básicos do Rotary" (João O. Veiga, (MG));

- "Viagem ao Canadá para participação no curso 'NASK' e no congresso local" (Ismael Ávila, SP)

- Debate com escritores e tradutores de Esperanto.

Num breve momento de arte, o Esperantista Cícero G Soares, acompanhado de violão, apresentou canções do repertório brasileiro vertidas para o Esperanto.

O 17º Congresso de Esperanto foi encerrado ao ar livre, durante excursão dos participantes no Parque Vicentina Aranha, em S. José dos Campos, no final da manhã de domingo.

KONGRESO DE ESPERANTO EN LA ŜTATO SANPAŬLO ELSTARIGAS LA GRAVECON DE LITERATURO

La kultura formiĝo de ĉiu popolo dependas de multaj elementoj. Unu el ili estas literaturo, kiu helpas kunmeti la kolektivajn spiritojn. Francujo ne estus la sama sen Victor Hugo; Anglujo, sen Ŝekspiro; Brazilo, sen Machado de Assis. Ankaŭ la "Esperantista popolo" havas siajn klasikulojn kaj siajn modernajn aŭtorojn.

Ĉi tiaj estis la ideoj, kiuj viglis dum la 17-a Kongreso de Esperanto en la Ŝtato Sanpaŭlo, kiu okazis je la 20-a kaj 21-a de septembro 2025, en la urbo S. José dos Campos, organizita de Esperanto-Asocio de Sanpaŭlo.

Partoprenis parolantoj de la Internacia Lingvo el sep brazila ŝtatoj. La programo, sub reĝisorado de la juna poliglota Esperantisto Wilian Gomes (SP), inkluzivis prelegojn, diskutojn, artajn momentojn kaj vendadon de libroj. Tiuokaze, estis lanĉitaj kvar novaj libroj en Esperanto, ĉiuj eldonitaj de la menciita asocio kaj disponeblaj en ĝia librovendejo:

- "Morto sur la Relikvo", originala romano de Adonis Saliba;

- "Prediko de la Diabolo kaj aliaj rakontoj" ("O Sermão do Diabo e outros contos"), de Machado de Assis, tradukita de Francisco S. Wechsler;

- "Negrinjo kaj aliaj noveloj", de Monteiro Lobato, tradukita de Paulo S. Viana kaj Francisco S. Wechsler;

- "La Ribelema Raŭpeto", infanlibro de Dirce Sales.

Inter la prelegoj, estis la jenaj temoj:

- "Poezio transiras tempon", de Saulo Wanderley (RJ);

- "Traduko de kantoj kaj poemoj al Esperanto", de Cícero G. Soares (BA);

- "Filatelio - la lingvodiverseco", de James R. Piton (SP);

- "Monteiro Lobato kaj la cenzuro", de Francisco S. Wechsler (SP);

- "La graveco de literaturo por infanoj kaj junuloj", de Dirce Sales (RJ);

- "Monteiro Lobato: lia vivo kaj malfacilaĵoj por traduki liajn verkojn" kaj "Diskuto pri la Esperantomovado en la 21-a jarcento", de Paulo S. Viana (SP);

- "Programo Mia Amiko" kaj "Kion povas la Artefarita Intelektulo", de Adonis Saliba (ES);

- "Bazaj Principoj de Rotario", de João O. Veiga (MG);

- "Vojaĝo al Kanado por NASK kaj la loka kongreso" de Ismael Ávila (SP);

- *“Diskuto kun verkistoj kaj tradukistoj.*

Dum nelonga arta momento, Cícero G. Soares, akompanate de gitaro, kantis kelkajn kanzonojn el la brazila repertuaro, tradukitajn al Esperanto.

La 17-a Kongreso de Esperanto en la Ŝtato Sanpaŭlo fermiĝis sub libera aero, okaze de ekskurso de la partoprenantoj en Parko Vicentina Aranha, en la urbo S. José dos Campos, je la fino de la dimanĉa mateno.

ESPERANTO - A VERDADEIRA LÍNGUA INTERNACIONAL